

# ESPERANTO

## TRIUMFONTO

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

**Abono** ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admonilon**. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por **Abono** oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 ŝved. kr., 0.30 ŝvis. fr., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3/2 pencoi, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 4 germ. mk. (por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj), 2 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., 50 pol. mk., 70 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupono.

Por adresaĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj **Abonejoj** en diversaj landoj — vidu sur paĝo 41! — Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo — kostas kvaronjare 65 mk.

Nur 340 Adreskartoj ni ĝis nun ricevis; do mankas ankoraŭ tre multaj!

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Noria, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonjo)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

**REDAKTOROJ:**  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Felieta red.: Zanoni.

**ADMINISTREJO:**  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtĉekkonto Köln 70863,  
por Teo Jung, Horrem.

**ANONCOJ:**  
el ĉiuj landoj 5 germ. mk.,  
po cm<sup>2</sup>. ĉe grandaj aŭ  
ripetataj anoncoj rabato.

Numero 85 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 21. Majo 1922.

# Monumenton al D-ro Zamenhof!

**La XIII-a Kongreso de Esperanto, okazanta en Praha la 1.—6. aŭgusto 1921, decidas, ke estas necese konstrui taŭgan monumenton sur la tombo de D-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, kaj rekomendas la projekton de la iniciatintoj al la sindona subteno de la tutmonda Esperantistaro.**

(Rezolucio unuanime akceptita ĉe la XIII-a Kongreso de Esperanto en Praha 1921.)

Ni citas elĉerpaĵon el la parolado farita de la proponanto de la supra rezolucio ĉe la kongreso, s-o J. D. Applebaum, la honora sekretario de la Internacia Komitato por la Monumento Zamenhofa. Submetante la proponon al la rekomendo de la Kongreso, li diris interalie: „Kiel fidelaj Esperantistoj, kiuj forte kredas je la estonteco de Esperanto kaj ĝia fina triumfo kiel monda helpolingvo, ni havas nenian dubon, ke tiu modesta sed sankta peco da tero, kie kuŝas la cindroj de nia Majstro, fariĝos centro de tutmonda pilgrimado por la estonta generacio. Memorante tion, ni, kiuj havas la privilegion nuntempe plisanktigi tiun pecon da tero per nia laboro por la kara afero, ne devas preterlasi la okazon de konstruo sur tiu peco da tero edifoplenan monumenton, kiu rakontos al la estontaj pilgrimantoj pri la amo kaj estimo, kiujn ni sentis al la kreado de Esperanto.“

Pledante por la aprobo de la rezolucio, li daŭrigis:

„Ĝi estas komenco, kiu eble povas konduki nin al pli grandiozaj skemoj, kaj, ĉar ĉiuj komencoj estas malfacilaj, ili devas esti sufiĉe modestaj kaj simplaj por pli bone certigi ĝian sukceson. Mi tamen volas atentigi vin pri la fakto, ke tiu projekto entenas vaste streĉiĝeblajn kapablecojn. Ni celas organizi tutmondan monokolekton per sistemo de kupon-kartoj. Ni diras en la plano, ke, se restos sumo, ĝi povas esti uzata por alia taŭga memoriga celo. Oni ne devas posedi tro grandan senton de imageco por kompreni la vastan kapablon de tia entrepreno, kiu enhavas tiun kondiĉon: „se restos sumo“. Per tiu restaĵo ni povas atingi grandajn altajojn. Ni povas daŭre kolekti per nia organizo tiajn monsumojn, ke la restaĵo fariĝu pli grava ol tiu, kiun ni nun intencas.“

## Historia Skizo kaj Raporto de la Honora Sekretario de Organiza Komitato.

La unua penso, kiu eniris la kapon de ĉiu Esperantisto ekaŭdinta pri la morto de la Majstro, estis, kiel honorigi lian memoron per monumento. Oni povis fari malmulte dum la militaj jaroj, kiam la tutmonda Esperantistaro estis disŝirita per la mondaj haosoj kaj internaciaj bariloj. Eĉ dum tiu tempo kelkaj naciaj societoj komencis kolekti monon por iu tia celo. La nederlanda societo „La Estonto Estas Nia“ faris kolekton, kies sumon ĝi nun metis je la dispono de nia komitato. La Germana Esperanto Asocio ankaŭ faris monokolekton por la sama celo. (Nia komitato aŭdis ĝis nun nenion pri la mono, sed ni havas nenian dubon, ke la sumo venos en nian kason.) Sendube ankaŭ aliaj naciaj societoj jam pripensis aŭ eĉ komencis fari similiajn preparojn. Tuj post la morto de la Majstro aperis en la „British Esperantist“ (junio 1917) letero de s-ino Maria Elsworthy-Posenaeer, konata belga Esperantistino tiam loĝanta en Anglujo, sub la titolo „Je la memoro de nia majstro. — Grava propono“. En tiu letero s-ino Elsworthy-Posenaeer faras la interesan proponon, ke la venonta kongreso okazu en Varsovio kaj la ĉefa soleno dum tiu kongreso estu inaŭguro de monumento starigita de la Esperantistoj sur la tombo de nia Majstro.

### La unua paŝo.

Tiu publika propono estis, tiom kiom mi scias, la unua, kiu aperis en iu ĵurnalo, nenio tamen estis farita internacie kaj kolektive rilate al la afero ĝis la XII-a Kongreso de Esperanto en Hago 1920. Tiam la skribanto de ĉi tiuj linioj, kiu estis vizitinta Varsovion kaj la domon de la Majstro pli frue en la jaro, publikigis artikolon en kelkaj Esperantaj ĵurnaloj pri tiu vizito kun la sugestieto pri monumento, priparolis la ideon

monumentan private kun kelkaj eminentaj samideanoj, kiuj tulkore aprobis la ideon. Ili konsilis starigon de malgranda internacia komitato konsistanta el bone konataj Esperantistoj por antaŭenpuŝi la priparolitan projekton.


Rezulte el longa korespondado la komitato estis formata kaj la honora sekretario kun la konsento de la anglaj komitatoj faris la unuan paŝon ĉe la Brita Esperanta Kongreso en Harrogate 1921. Por sukcesigi tiun projekton, la ĉefaĵo kompreneble estas la kolekto de la sumo bezonata. Por provi la popularecon de la projekto inter la samideanaro, ni disdonis en Harrogate inter la kongresantoj specialan folieton, klarigante en ĝi mallonge la ideon de Monumento Zamenhofa; ni petis la legantojn fari al ni promeson por mondonacoj. La respondo al tiu folieto estis tiom kuragiga, ke la iniciatintoj konsideris la projekton akceptebla de la Esperantistaro kaj tuj decidis meti la tutan aferon antaŭ la XIII-a Kongreso de Esperanto en Praha en formo de rezolucio.

### La dua paŝo.

Ĉar oni ne dubis pri la tulkora akcepto de tiu rezolucio, ni prenis la duan paŝon kaj pretigis specialan folieton, en kiu ni petis mondonacojn de la kongresantoj en Praha. La folieto estis aldonata al la kongresaj dokumentoj kaj transdonata al ĉiu kongresano. La rezolucio estis unuanime akceptata ĉe la kongreso, la ideo tuj eniris en la koron de la Esperantistaro, kaj la sekretario penadis dum la kongreso kolekti monon. Kvankam la sumo kolektita dum la kongresaj tagoj (ĉ. 4000 Kč.) estis bagatela kompare al la granda ĉeestantaro, oni nepre devas konsentii, ke la laboro por la monumenta ideo farita dum la kongreso, de multaj vidpunktoj, havis grandan valoron. Unue, ĉar la tuta projekto eliris el la privata iniciato kaj transiris en la publikan vivon de la tutmonda Esperantistaro. Projekto, kiu estis akceptita publike de internacia kongreso, ne povas resti propraĵo de iu privata komitato aŭ individuo. Tion oni tuj povis senti kaj aŭdi de ĉiuj flankoj. La morala subteno, kiun ricevis de la ideo pro la akcepto de la rezolucio, estis ne takebla por ĝia eventuala sukceso. Due, la ideo ricevis grandan reklamon, kiu multe helpas ĝian estontan sukceson. Trie, ni ja efektive ricevis monon por nia kaso.

### La tria paŝo.

La tria paŝo devis esti la presigo de la kupon-kartoj kaj ilia disvastigo inter la tutmonda Esperantistaro laŭ la plano, por komenci kaj daŭrigi la monokolekton. Ĉi tie haltis iomete la progreso de la projektita afero. La ĉefaj kaŭzoj de tiu haltigo estas la subita falo de la mez-eŭropa monkurzo, kiu okazis ĉe la fino de 1921, la malfacilaĵo trovi aŭgan desegnon por la kupon-karto kaj la presigo de la kupon-karto, kies koston kaj stilon de la eldono la komitato zorge devis studi. Unu presisto post alia, unu artisto post alia alsendis desegnon, prezon kaj stilon, kiuj ne estis akceptindaj, kaj dume multe da tempo estis perdita.



(Fot. „Studio“, Varsovio)  
La modesta tombo de la Majstro.  
(El la memorlibreto „La Lastaj Tagoj de D-ro L. L. Zamenhof“.)

La komitato sentis, ke ĝi ne povis daŭrigi la agitadon por plua monokolekto, ĝis la eldono de la kupon-karto, laŭ la elkizita plano antaŭ la Praha Kongreso, estos kompleta, tial oni faris nenion oficiale, rilate al la monokolekto, de la Praha kongreso ĝis nuntempe. La kupon-kartoj estas nun en la manoj de la presisto, kaj oni povas konstati, ke la efektiva laboro komenciĝas nun. Kiam la kongreso okazos en Helsinko, la komitato havas la esperon povi raportu pli bonan kaj pli kontentigan progreson. Ke la intereso en la monumenta projekto ne mortis, ni povas konstati per la diversaj leteroj kaj multflankaj enketoj, kiujn ni daŭre ricevas de diversaj centroj de Esp.

### Pri la konkurso.

Post longa prikonsiderado, la komitato venis al la konkludo, ke la originala intenco, starigi mond-konkurson por la desegno kaj arto-konstruo de la monumento, ne estas konsilinda; anstataŭ tio oni aranĝas lokan Varsovian konkurson kun la konsento de la Varsovia Monumenta Komitato. La aranĝoj de tiu konkurso estas nun en la manoj de tiu komitato, kiu ricevis definitivajn instrukciojn ĝin organizi kiel eble plej baldaŭ. Raporto de la Varsovia Komitato aperas aliloke.

## La Komitatoj.

### Listo de la Iniciatintoj:

Prof. Th. Cart, Paris; d-ro W. Róbin, Warszawa; generalo Sebert, Paris; s-o Ed. Stettler, Bern.

### Organiza Komitato:

J. M. Warden, Edinburgh, Skotlando; W. M. Page, Edinburgh, Hon. Kasisto; J. D. Applebaum, Liverpool, Hon. Sekretario.

La sekvantaj subskribis la unuan alvokon kaj promesis sian apogon kaj helpon ĉiurilate:

Belga Esperanto Asocio Fr. Schoofs, prez.  
Brita Esperanto Asocio J. M. Warden, prez.  
Centra Dana Esperantista Ligo

Germana Esperanto Asocio D-ro A. Steche, prez.  
Federacio Esp. Itala D-ro Monti, sekr.  
Nederland Societo J. R. G. Isbrücker, prez.  
Franca Societo por Prop. de Esp.

Rollot de l'Isle, prez.  
Kataluna Esperanto Federacio Sandelyon, sekr.  
Esperanto Grupo de Lyon

s-ino Farge kaj L. Poncet  
Universala Esperanto Asocio Ed. Stettler, prez.

### Loka Komitato en Varsovio.

D-ro W. Róbin, Leo Belmont, Essigman, Domo-slowski, Kensicki, inĝ. Teichfeld, Lonkopolanski, d-ro I. Krenicki, d-ro inĝ. Dubrowicz.

## Kion celas la Organiza Komitato?

Ĉiu individua Esperantisto kaj Esperanta organizo tra la mondo komprenu, ke la projekto ne estas privata, sed publika afero de la tuta Esperantistaro. La personaro de la nuna internacia komitato nek volas nek povas alproprigi al si la laboron aŭ la ideon de la organizo. La komitato laboras nur por la bono de la projekto, kaj ĉiu Esperanta kongreso internacia havas la rajton aldoni, eksigi aŭ ŝanĝi la anojn de la komitato, eĉ dissolvi la tutan organizon, se ĝi trovas tion dezirinda.

La komitato neniel havas la intencon limigi la monokolekton nur al la bezonoj por monumento sur la tombo de la Majstro, tio estas nur la unua kaj la plej urĝa neceso nuntempe, pri kio la komitato jam prenis la unuajn paŝojn pere de la loka Varsovia Komitato. La eventuala starigo de publika monumento, preferinde en Varsovio, estas en la programo, se ĝi estas efektivebla. Rilate al tiu lasta propono ekzistas ankaŭ diversaj opinioj, nome, ke tiu publika monumento prenu la formon de aĉeto de domo por Publika Esperanta Muzeo, kiu ankaŭ povus esti uzata kiel loĝejo por la familio de la Majstro. Tiu lasta propono sendube trovos la plej grandan favoron ĉe nia Esperanta publiko kaj sekve ricevos la plej grandan subtenon.

La tutmonda monokolekto per la sistemo de kupon-kartoj devas fariĝi ne nur dumtempa, sed daŭra institucio inter la Esperantistaro. La monokolekto neniam devas halti ĝian progreson. De tago al tago la Esperanta publiko kaj la amikaro de Esperanto kreskas tra la mondo; kiam iu ajn societo estos eluzinta ĉiujn kupon-kartojn ĉe siaj malnovaj amikoj, ĝi devas havigi al si novan provizon por kolekti ĉe la novaj adeptoj kaj konvertitoj. La kampo en tiu direkto nepre estas senlima, kaj tio povas esti daŭrigota, ĝis kiam la tempo venos kaj la supera aŭtoritato, t. e. la Internacia Kongreso de Esperanto, dekretos, ke la sumo bezonata estas atingita, kaj dissolvos la organizon.

La mono estu kolektata de tiom da individuaj Esperantistoj tra la mondo, kiom eble, tial ke ni vere povas diri, ke tiu monumento estos starigita de la tutmonda Esperantistaro, kaj eble estos interesa por la posta historio, arangii tiel nomitan Oran Libron, en kiun ni enskribu ĉies nomon kaj adreson de la mondonacantoj al tiu unika monumento, sed ĉio ĉi tio estas afero de la Esperantistaro, de kiu la komitato volonte akceptos opiniojn kaj konsilojn pere de gazetoj kaj leteroj.

## Privata Propono

por la surtomba Monumento.

Obelisko granda, kvinflanka lumturo. Staru sur bazo de granitoj aŭ ŝtonoj el ĉiuj landoj, ekz. el Skotlando, Italujo, Norvegujo ktp. Lokaj grupoj zorgu pri la ekspedo de la ŝtonoj al Varsovio tra Danzig.

Devizo: „Estu lumo!“

## Teksto.

Alsendita de Zanoni.

Ne enterigu kun la homo  
Lia tre kara granda nomo.  
Montru per bela, tomba ŝtono  
Dankon tutmondan por la bono,  
Kiun donacis granda homo;  
Restu senmorta lia nomo!



# XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko-Helsingfors, Finnlando

8.—16. aŭgusto 1922,

Oka Komuniko.

1. *Protokolo de la kongreso.* La prezidanto de la Respubliko Finnlando akceptis la XIV-an Universalan Kongreson de Esperanto sub sian altan protekton.

2. *La aliĝo.* Rapidu aliĝi! Per tio vi faras grandegan servon al la kongreso. Kaj atentu: la aliĝkosto plialtiĝos de la 1. julio.

3. *Alveturo kaj reveturo.* Prezoj sur la ŝipo Rügen: Stettin—Helsinki l. kl. 4000 gmk., II. kl. 2800 gmk.; Helsinki—Stettin l. kl. 720 fmk., II. kl. 560 fmk.

4. *Ekskursoj.* La nova horaro de la marŝipoj al kaj el Finnlandaj havenoj estas en multaj rilatoj pli favora al la kongreso ol la antaŭa. Tiel i. a. je la vidpunkto de la ekskursoj.

*Dum la kongreso* okazos unutaga ekskurso al Borgå, kun alveturo perŝipa kaj reveturo per vagonara por duono de la partoprenantoj; la dua duono veturos inverse. Al la ekskurso estos verŝajne rezervata dimanĉo, la 13. aŭgusto. Pri la kostoj estas malfacile doni ankoraŭ precizan informon. La ordinara veturprezo estas: vagonare II. kl. 17,25 fmk., III. kl. 11,50 fmk.; ŝipe l. kl. 18.— fmk., II. kl. 12.— fmk.

*Post la kongreso.* Aludante al la ĝeneralaj notoj en la 1-a § de la 5-a komuniko, ni donas novan horaron, akomoditan al la veturplano de la marŝipoj. Pro diversaj kaŭzoj ni devas rezervi al ni rajton je la ŝanĝo. Ni citas la ekskursojn komencante de la plej mallonga. Laŭ ricevita propono ni uzas la 24-horan dividon de la tago.

1. El Helsinki la 16. VIII. je 21.32 vagonare al Viborgo. Vizito rapida de la urbo, veturo al Imatra kaj Vuoksenniska, de kie per vaporiŝipo al Lappeenranta. Reveturo vagonare la 18. VIII. je 23.22. Alveno en Helsinki la 19. VIII. je 6.55. Al Lübeck kaj Stokholmo je la 10 h., al Stettin je la 12 h., al Kopenhago 20. VIII. je 10 h. II. kl. 210 mk., III. kl. 145 mk.

2. a. Helsinki—Viipuri—Imatra kiel 1. Pli longa restado ĉe la akvofaloj kun vizito de Vallinkoski sub Imatra. El Vuoksenniska la 18. VIII. vespere ŝipe al Savonlinna. Vizito de la belega kastelo kaj de Punkaharju. Revendo aŭ vagonare kun halto en Viborgo aŭ ŝipe tra Lappeenranta. Al Helsinki 22. VIII. je 21.15. Elveturo sekvantan matenon por Stokholmo je 10 h., por Stettin je 13 h., por Hull je 19 h. II. kl. 290-315mk., III. kl. 200-225 mk.

2. b. Pli longa restado en Savonlinna, Punkaharju aŭ Viborgo. Al Turku—Åbo la 24. VIII. je 11.45, elveturo por Stokholmo je 23.45. II. kl. 315-340 mk., III. kl. 215-240 mk.

2. c. Simile kiel 2. b. Al Hango 24. VIII. je 15.09, elveturo por Hull je 15.30. II. kl. 310-335 mk., III. kl. 210-235 mk.

3. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna kiel 2. Rapida vizito de la urba kastelo kaj de Punkaharju; ŝipe al Joensuu, vagonare al Vuonislahti, motorboate al Koli. Reveturo vagonare al Viborgo—Helsinki aŭ Turku aŭ Hango, forveturo kiel 2. a, b aŭ c. II. kl. 490-515 mk., III. kl. 355-370 mk.

4. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna—Punkaharju kiel 2, kun sufiĉa tempo por ĉiuj vidindaĵoj. Ŝipveturo al Kuopio, vagonare al Kajaani, ŝipe al Vaala, per gliĉboato laŭ la akvofaloj al Oulu. El Oulu 25. VIII. meztage per vagonaro al Turku (26. VIII. je 11.45; el Turku por Stokholmo je 23.45) aŭ al Helsinki (26. VIII. je 11.00; el Helsinki por Stettin je 12.00). II. kl. 630 mk., III. kl. 460 mk.

5. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna—Punkaharju—Koli kiel 3, sed kun sufiĉa tempo

por la vidindaĵoj. De Koli al Valamo. De tie fervoje tra Viborgo al Helsinki kaj Turku, atingante la samajn ŝipojn kiel en 4, kaj krom tio ankaŭ la ŝipojn, kiuj elveturas el Helsinki la 26. VIII. je 10 h. por Lübeck kaj Stokholmo. II. kl. 540-565 mk., III. kl. 390-415 mk.

6. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna—Punkaharju—Koli kiel 5. De Koli reveturo ŝipe al Savonlinna kaj daŭrigo laŭ 4 al Kuopio—Kajaani—Vaala—Oulu. Reveturo al Helsinki 29. VIII. je 11.00. El Helsinki 30. VIII. por Kopenhago kaj Stokholmo je 10 h., por Stettin je 13 h., por Hull je 19 h. II. kl. 820 mk., III. kl. 630 mk.

5. *Kongresa banko.* Pro diversaj kaŭzoj ni devis ŝanĝi la kongresan bankon. Nia banko de nun estas Luottopankki Oy. — Ni atentigas ankoraŭfoje, ke estas plej profite sendi la aliĝojn kaj deponojn al la LKK, per bankĉeko en via nacia mono, pagota en vialanda ĉefurbo laŭ la ordo de la LKK. Tiajn ĉekojn ni povas monigi je plej favora kurzo.

6. *Pasportaj aferoj.* La vizo al Finnlando kostas, sendepende de la nacieco aŭ deveno de la petanto, en Tallinn 375 est. mk., Skandinavio 7 kr., Berlin 50 gmk., Varsovio 7500 pmk., Zürich 10 fr., Paris 20 fr., London 10/— ŝil., Usono 10 dol.

7. *Aliĝoj.* La ĝisnunaj aliĝintoj estas el sekvantaj landoj:

Germanio 35, Britlando 31, Estonio 27, Pollando 25, Nederlando 19, Aŭstrio 15, Francio 13, Ĉeĥoslovakio 11, Italio 6, Hungario 5, Litovio 4, Svislando, Danlando, Latvio po 3, Rumanio 2, Svedlando, Hispanio, Usono, Turkio, Kanado, Japanlando kaj Venezuelo po 1. Finnlando 99, entute 308 aliĝintoj el 23 landoj.

8. *Helpkongresanoj* aliĝis ĝis nun 25.

9. *Garantia kapitalo* atingis entute fmk. 15500.—

10. *Donacoj* ricevitaj de LKK: Subvencio de la ŝtato fmk. 50000.—, subvencio de la Urbo Helsinki fmk. 10000.—. Entute ĝis nun fmk. 69 666,08.

*Blindula kaso.* La LKK danke notas por la eldona kaso de la blindaj Esperantistoj ĝis nun donacojn de entute fmk. 660,14.

*La Loka Kongresa Komitato.*  
Adreso: Poŝta (ankaŭ por mensendo): XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando  
Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

## Laboristaro.

**Standardfesto de Lab. Esp. Societo Budapest.**  
La 30. aprilo okazis tuttaga festo de Hungaranda Lab. Esp. Societo. Ĝi signas en la hungara Esp. movado grandan progreson, inaŭguron de peresperanta socialismo inter la hungara laboristaro.

Antaŭtagmeze okazis la transpreno de bela standardo, donacita de sekretario s-ano Yzso Esp. kantistaro de laboristoj malferris la feston, kiun partoprenis delegitoj, oficiale senditaj de la fak-organizaĵoj, de ĵurnalo „Popolvoĉo“, de sportaj societoj, de Esp. grupoj ktp.

Antaŭ grandnumbra ĉeestantaro aŭdiĝis la paroladoj de la delegitoj, kaj la entuziasmaj vortoj de s-ano Yzso. Ĉiuj delegitoj aprobis Esperanton kaj ĝian enkondukon inter laboristaj organizaĵoj. — En la nomo de UEA parolis s-ano Balkányi. Li diris, ke UEA laboras por Esperanto, laboristoj laboras per Esperanto. Ĉe UEA Esperanto estas celo, ĉe la laboristoj ĝi estas ilo. Se UEA plifortigas la celon, ĝi povas esti potenco ilo en la manoj de la laboristoj. Tial ni al celoj ne estas kontraŭaj, ni laboru en paca konkordo!

Post la festo oni fotografiis la publikon por la gazetaro, kaj okazis komuna tagmanĝo. — Vespere okazis bone aranĝita kabaredo. — Dum la tuta festo deĵoris skoltoj. Ankaŭ oni disdonadis reklampaperojn, Esperante redaktitajn.

ŝtaton. Vere, la emon al morto signifas ĉi tiu signo! Vere, ĝi logas la predikantojn de l' morto!

Multe tro multaj naskiĝas: por la superfluaĵoj oni elpensis la ŝtaton!

Jen rigardu, kiel ĝi allogas ilin, la multe — tro — multajn! Kiel ĝi englutas ilin kaj maĉas kaj remaĉas!

„Sur la tero estas nenio pli granda ol mi: la ordiganta fingro mi estas de Dio“ — jen kiel kriegas la monstro. Kaj ne nur longoreluloj kaj mallongviduloj falas sur la genuojn.

Ho, ankaŭ al vi, vi grandaj animoj, ĝi enspiras siajn malhelajn mensogojn! Ho, ĝi divenas la riĉajn korojn, kiuj volonte kaj malavare sin donas!

Vere, ankaŭ vin ĝi divenas, vi venkintoj de la estinta Dio! Lacaj vi fariĝis batalante kaj nun via laceco servas ankoraŭ al la nova idolo!

Heroojn kaj virtulojn ĝi volus kolekti ĉirkaŭ si, la nova idolo! Volonte ĝi ĝuas varmon en la suna brilo de bonaj konsciencoj — la malvarma monstro!

Ĉion ĝi promesas al vi, se vi ĝin adoras, — la nova idolo: jen kiel ĝi aĉetas la brilon de via virto kaj la rigardon de viaj ŝeraj okuloj.

Kapti ĝi volas per vi la multe — tro — multajn! Vere, infera artiŝko jen estas elpensita: ĉevalo de l' morto, tintanta en la ornamo de diaj honoroj!

Vere, mortado por multaj jen estas elpensita, mortado, kiu sin mem glorias kiel vivadon: vere, kora servo al ĉiuj predikantoj de l' morto!

Ŝtato estas laŭ mi, kie ĉiuj estas trinkantoj de veneno, bonaj kaj malbonaj: ŝtato, kie ĉiuj sin mem perdas, bonaj kaj malbonaj: ŝtato, kie la malrapida sinmortigado de ĉiuj nomiĝas — „la vivo“.

Jen rigardu tiujn superfluaĵojn! Ili ŝtelas la verkojn de la eltrovitoj kaj la trezorojn de la

Resume: La hungara laboristaro komprenis la gravecon de Esperanto kaj laboras por ĝi. Citante la vortojn de unu el la delegitoj de fak-organizaĵoj, mi ripetas: „Vivu la mondon savanta Esperanto-unueco!“

(J. Major.)

## Vojaĝoj de Esperantistoj.

**Aŭstrala samideano s-o Hudson en Pollando.**

Tre interesajn raportojn ni legis en diversaj polaj gazetoj kaj ankaŭ ni mem ricevis pri la vojaĝo de s-o Hudson, kiu mondvojaĝas jam de post majo 1921 kaj ankaŭ vizitis la XIII-an en Praha. S-o H. scias nur Esperantan kaj anglan lingvojn, do li estas devigata vojaĝi per la helpo de l' Esperantistoj, kiuj lin ĉie akceptis tre kore. Speciale la samideanoj en Kraków havis grandan ĝojon pri la vizito de la fremdlanda gasto kaj montris al li dum du semajnoj la faman urbon de nia Oka kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. S-o H. intencas poste viziti Germanlandon kaj Belgion. Kompreneble la vojaĝo de la aŭstrala samideano ne estas nur peresperanta, sed ankaŭ, vole nevole, peresperanta.

**Vizito de s-o Pitlik en Danlando.**

Antaŭ nelonge s-o Aug. Pitlik, la ĉefsekretario de la XIII-a, venis Danlandon por la Ministerio de Komercio en Praha. Li kunportis belajn lumbildojn pri Ĉeĥoslovakio (Praha, grotoj de Moravio ktp.), kiujn „Den Danske Touristforening“ prezentis al siaj membroj en Kopenhago, sendinte biletojn senpage al la Esperantistoj. La bildoj estas ankaŭ prezentitaj en Aarhus kaj Aalborg. Je la tago de l' alveno de s-o P. okazis sukcesplena Esp. vesperkunveno en Hotelo d' Angleterre. La feston partoprenis la legacia sekretario de la ĉeĥa ambasadoro, s-o d-ro Kučka, kaj du aliaj ĉeĥaj eminentuloj. Ankaŭ la prezidanto de la Turista Unuiĝo, prof. Karl Larsen, kaj la sekretario s-o Xenius Rostock ĉeestis. La gazetaro havis longajn artikolojn pri s-o P., pri Ĉeĥoslovakio kaj pri la Esp. kunveno.

**La mond biciklado de nederlandaj samideanoj.**

S-o Seubring, kiu kune kun sia amiko s-o Stoeltje faris bicikladon al la kongreso de Praha kaj poste trabiciklis Francujon kaj Hispanujon, nun estas en Italio. En „Holanda Esperantisto“, n-oj de 13. kaj 27. aprilo, s-o Seubring donas interesan priskribon pri iliaj unuaj aventuroj en Italio kaj pri la transbiciklado de l' Apenin-montaro dum malbonega neĝa vetero.

## Hebreoj.

**I-a Komuniko de TEHA (Tutmonda Esp. Hebrea Asocio).**

Karaj samideanoj hebreaj!

Sekve de mia alvoko en n-o 80 de ET vi bonvolis tuj aliĝi kaj promesi vian helpon. Koran dankon al ĉiuj! La letero de nia gvidanto s-ano I. Muĉnik el Palestina estas jam rondiranta tra Eŭropo kaj vi, aliĝintaj sekve de ĉi-supre menciita alvoko, baldaŭ ĝin ricevos. Bonvolu memori, ke antaŭ ol vi pluen sendos la leteron, vi havos la okazon aliĝi al TEHA pere de la letero plurajn novajn anojn en via urbo.

Jen la nomaro de samideanoj petintaj kaj laŭvice ricevitaj la leteron: Heller (Ĉeĥos.), Lewin, Schön (Germ.), Urbach (Belg.), Mildwurf, Tannenbaum (Aŭstr.), Pruski, Kaplan, Ezersky, Fischer, Jurysta (Pol.).

Novaliĝantoj ricevos al ian rondiraĵon similan al la unua. Adreso: TEHA, ĉe Societo Esperanto, Kraków, Slawkowska 6 (Pollando).

Samideanoj! Por ke TEHA povu fine konstituiĝi antaŭ la XIV-a, ĝi bezonas sufiĉe grandan nombron da anoj. Tial ne hezitu, sed aliĝu tuj!

Leopold Dreher,  
prov. hon. sekr. de TEHA.

saĝuloj: klereco ili nomas sian ŝtelitaĵon — kaj ĉio fariĝas por ili malsanaĵo kaj malbonaĵo!

Jen rigardu tiujn superfluaĵojn! Malsanaj ili estas konstante, ili elvomas sian galon kaj nomas tion gazeto. Ili sin englutas, reciproke kaj eĉ ne povas diĝesti unu la alian.

Jen rigardu tiujn superfluaĵojn! Riĉaĵojn ili akiras kaj plimalriĉiĝas per tio. Potencojn ili celas kaj antaŭ ĉio la rompilon de la potenco, multe da mono, — tiuj senpotenculoj!

Jen rigardu ilin grimpantaj, tiujn rapidemajn simiojn! Ili grimpas unu super la alian kaj tiel sin tiras en la ŝlimon kaj profundon.

Al la trono ili ĉiuj celas: ilia manio estas tio, — kvazaŭ la felico sidus sur la trono! Ofte ŝlimo sidas sur la trono kaj same ofte la trono sur ŝlimo.

Maniuloj ili estas ĉiuj kaj grimpantaj simioj kaj trapidemuloj. Malbone odoras ilia idolo, la malvarma monstro: malbone ili ĉiuj odoras, tiuj idolservantoj.

Fratoj, ĉu vi ja volas sufokiĝi en la haladzo de iliaj buŝoj kaj deziretoj? Prefere rompu la fenestrojn kaj trasaltu eksteren!

Evitu la malbonan odoron! Iru for de la idolservado de tiuj superfluaĵoj!

Evitu la malbonan odoron! Iru for de la haladzo de tiuj homaj oferaĵoj!

Libera estas por grandaj animoj ankoraŭ nun la tero. Neokupitaj estas ankoraŭ multaj lokoj por unuopuloj kaj duopuloj, — kiujn ĉirkaŭblovas la odoro de kvietaj maroj.

Libera estas ankoraŭ por grandaj animoj — sendependa vivado. Vere, kiu posedas malmulton, tiom pli malmulte estas posedata: benata estu la eta malriĉeco!

Tie, kie ĉesas la ŝtato, nur tie komenciĝas la homo, kiu ne estas superflua: jen komenciĝas la

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperanto en Finnlando.

Interesan statistikon donas „Esperanta Finnlando“ en sia aprila numero. Laŭ ĝi aliĝis al Esp. kursoj almenaŭ 3700 personoj en la jaro 1921, kontraŭ ĉ. 2000 en 1920, 1000 en 1919 kaj 500 en 1918.

Kurso okazas ĉe metodista misia domo en Helsinki (20 partoprenantoj), aliaj kursoj en Ilmajoki (20 p.), Kauhava (30 p.), Kotka, Kouvola, Kurikka (20 p.), Laihia, Pori (2 kursoj, 70 p.), Sodankylä, Sydänmaa (50 p.), Turku kaj Vaasa.

Germanujo.

Neĉeviga Esp. instruado ĉe kvin popollernejoj en Potsdam. — Esp. Grupo Grand-Berlino vigle laboras. Funkciaj kursoj por komencantoj en Charlottenburg, Friedrichshagen, Neukölln, Steglitz, Wilmersdorf, en la Centro kaj la Sudoriento de la urbejo, plue funkciaj Esp. kursoj ĉe Humboldt-Akademio, ĉe la 4-a Wahlfortbildungsschule kaj ĉe popola altlernejo Schöneberg-Friedenau, kaj kursoj por progresintoj en Charlottenburg, Wilmersdorf kaj Friedenau.

Farmaciistoj kaj Esperanto.

La Internacia Farmaciista Federacio havis gen. kunvenon de delegitoj la 28. ĝis 29. aprilo en Bruxelles, en la sidejo de la nacia unuigo de belgaj farmaciistoj. La kunveno decidis krei specialan komisionon de la internacia farmakopeo. Ĝi akceptis la proponon de s-o C. Rousseau el Levallois-Perret, ekspez. de la Ĝenerala Sindikato de Francaj Farmaciistoj, ke la terminaro estu ellaborata en angla, franca, germana kaj Esperanta lingvoj. La kunveno enhavis 30 delegitojn de naciaj asocioj de Belgio, Danujo, Francujo, Nederlando, Italujo, Luksemburgio, Rusujo kaj Svedujo.

Franclando.

Someraj kursoj en Rosny-sous-Bois kaj Neuilly-Plaisance (apud Parizo). — Kursoj de la Esp. revolucia grupo en Pantin kaj St. Quen (ap. Parizo).

Esperanta Fako

fondiĝis sub la protektorato de Hungara Nacia „Turul“ Asocio de Hungaraj Universitatoj kaj Ĉeflernejoj, kies celo estas la disvastiĝo kaj intensa kulturo de la lingvo Esperanto sub la signo de la hungara nacia spirito. Ĝi intencas kunligi ĉi tiu studentaro de la tuta mondo, fari grandan studentpropagandon, precipe koncerne la studentsociajn demandojn kaj la interŝanĝojn de studentoj. Samtempe komenciĝis Esp. kurso. Esperantistaj universitatoj kaj universitataj grupoj estas petataj interrilatiĝi kun ni laŭ adreso: Budapest IV, Szerb utca 10-15.

Marokujo.

En Casablanca soldato Guy Gezequel, de la 37-a avlada regimento, fondis Esp. grupeton en la tendaro Cazes.

Ĉeĥoslovakio.

La 30. 4. publike paroladis en Cervený Kostelec f-ino J. Šupichová, faka instruistino el Praha; la 6. 5. ŝi paroladis en la Unuiĝo de Ĉsl. Instruistinoj en Praha; rezultato: kurso por instruistinoj.

Pri Esp. movado en Ruslando

ni ricevis lastatempe multajn raportojn, kiujn ni pro manko de loko bedaŭrinde ne povis publikigi.

En Moskvo okazis la 6. marto lekcia-disputo pri Esperanto, ĉe Politeknika Muzeo. Oratoris diversaj eminentuloj. Gebinduloj kantis la „Esperon“. Ĉeestis ĉ. 400 personoj.

En Astrahan funkciaj du pagataj Esp. kursoj (honorario por tuta kurso unu orvaluta rublo); gvidas s-ano Riĉkov kaj Averin. Kursanoj deziras korespondi (adreso: Esperanto, Astrahanj, Moskovskaja, lernejo I-grada n-o 44, 2-a etĝ.)

kanto de la neceso, la unika kaj neanstataŭebla melodio.

Tie, kie ĉeas la ŝtato, — jen rigardu, fratoj! Ĉu vi ne vidas ĝin, la ĉielarkon kaj la pontojn de la superhomo? —

Jen kiel parolis Zarathustra.

\* \* \*

Traduko el la originalo.

## La vera magio.

Ĉi tio okazis vespere ĉe Kristnaska festo. Vilĉjo sidis en la unua vico de seĝoj.

„Nenia trompo,“ diris la jonglisto. „Jen la vera magio,“ kaj sin klinante li metis la unuan kaj la dikan fingrojn sur la supron de la kapo de Vilĉjo kaj komencis eltiri longajn spiralojn de verda papera rubando. Vilĉjo stariĝis, kaj la papero falis ĉiufanken. Sed la jonglisto eliris pli kaj pli multe, ĝis vidiĝis granda amaso. Baldaŭ Vilĉjo sin trovis preskaŭ kovrita per la rubandaĵo, tiel ke li estis devigata elrampi kun peno.

Tuj kiam li elrampis, li aŭdis, ke la jonglisto diris al la knabineto sidanta apud li:

„Permesu al mi, vi faligis vian donacon el magilando,“ kaj tuŝinte per la unua kaj la dika fingroj la plankon, li eliris el la tapiŝo pupeton surŝutitan per verdsteletoj.

„Prenu ĝin, karulino mia,“ li diris. Sed kiam la knabineto stariĝis kaj etendis al ĝi la brakojn, jen, ĝi jam malaperis!

„Ĝi sidas sur via seĝo,“ diris la jonglisto. Kaj tiel efektive estis!

„Kiam vi premas ĝin,“ klarigis la jonglisto, „ĝi diras magilingve: „Lernu mian lingvon.“ Kaj tiel efektive okazis!

\* gregoj: a.: herd (gregarious); f.: troupeau (grégaire); g.: Herde; lat.: grex. Intence mi evitis la vorton „aro“ aŭ „brutaro“, kiu ne reproduktas la veran sencan Rim. de l' trad.



## Memortabulo pri D-ro Zamenhof.

Polaj Esp. Societo, kiu okazigos la unuan tutpolan kongreson de Esperanto en majo en Warszawa, intencas fiksi specialan memortabulon al domo, kie loĝis d-ro Zamenhof plurajn jarojn ĉe Dzikowa n-o 9; ĝi estos farata en la nomo de la pormonumenta komitato.

## Libera Urbo Fiume.

S-ano Teodoro Kovacs komencis trian kurson por fervojistoj.

## Malbonvalutuloj atentulo!

Jam la 1. aprilo la kostoj por presoj, papero ktp. altiĝis je ĉ. 30%, kaj la 1. majo ili denove altiĝis je ĉ. 30%. Krom tio post 1. julio grave altiĝos la afranka tarifo. Do ni estas devigataj altiĝi niajn prezojn por ĉiuj malbonvalutaj landoj.

De n-o 86 validos jenaj prezoj: por germanoj, baltoj kaj balkananoj 4 gmk., por rusoj 2 gmk., por hungaroj 10 h. kr., por poloj 50 pmk. kaj por aŭstroj 70 aŭstr. kr. po numero. — Por anoncoj validos jenaj prezoj po 20 vortoj: por germanoj, baltoj kaj balkananoj 30 gmk., rusoj 15 gmk., hungaroj 75 h. kr., poloj 350 pmk. kaj aŭstroj 500 aŭstr. kr. — Anoncoj kostos po cm<sup>2</sup> 5 gmk.

## La venonta numero estos 6-paĝa

Speciala Numero pri la Nacia Ekspozicio Memoriga de la I-a Centjaro de l' Brazila Sendependeco, kun multaj ilustraĵoj. Ĝi estos senpage sendata al ĉiuj komercaj ĉambroj, ĵurnaloj, gravaj firmoj, societoj ktp., kiuj ĝin petos de la administrado de ET.

## Donacoj por la Monumento.

Pro manko de loko ni ne povas publikigi la plenan liston de la donacintoj. Ĝis aprilo 1922 estis enpezitaj la jenaj sumoj: 62.12.8 sterl. pund., 15 sved. kr., 100 lir., 1250 gmk., 99.114.30 pmk., 105 sviz. fk., 130 fr. fk., 20 b. fk., 20 pes., 2160 kr. aŭstr., 1 dol., 1 hfl., 2450 kĉ. — La sumo kolektita ĉe la Praha kongreso kaj deponita en banko tiea estas ĉ. 4000 kĉ. — Krom tio estas promesitaj 30 sterl. pd. de anglaj samideanoj kaj 20000 pmk. de UEA. — La profito de la postkongresa kunveno en Budapeŝt de tiea Esp. societo estas 500 hung. kronoj.

## Atentigo.

Pro instalo de novaj listoj, kartoteko ktp. ni ne povis ĝustatempe admoni en la lastaj semajnoj la abonantojn, kies abono estas finiĝonta. Ni petas la koncarnatojn sendi novan sumon por sia abonkonto, por seninterrompe ricevi ET.

## Gazetaro.

NEDERLANDO. Dum aprilo oni nombris 77 artikolojn pri Esperanto en la nederlanda gazetaro.  
FINNLANDO. Dum marto aperis 66 artikoloj pri Esperanto en 32 finnlantaj gazetoj.  
